NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NI
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Januaro 1988 175 Ekzem

3-a U.K. de Roterdamo.- Laŭ la Kongresa Komuniko de LKK oni ofertas tranokton kun maten-manĝo inter 50 kaj 100 guldenoj kaj ankaŭ malpli kostan loĝadon en junulargastejo (ĉ.25 gld.) kaj en komuna loĝejo. Se vi deziras profiti tion, vi devas peti frue kaj, komprene-ble, vi devas aliĝi al la Kongreso (petu aliĝilon ĉe MEL, sendu poŝtmarkon).
HEF organizos aviadila karavano al Roterdamo. Buĝeto 96.500 pes. Eliro tagon 24-de julio kaj reveno la tagon 31-a de julio.

GEjunuloj.Junulara Sekcio de HEF.- Laŭ la nunaj leĝoj de Hispanujo, oni konsideras gejunu ĝis la aĝo da 30 jaroj. Ĉiu membro de HEF ĝis 30 jaroj pagos nur la specialan kotizon da 1000 pes. ekde la venonta jaro 1988

MEL jam ricevis kelkajn respondojn de Esperanto-Grupoj rilate la atingon, dum 1987, de oficialaj helpoj kaj subvencioj,Bv. se via grupo ankoraŭ ne sendis tion faru rapide al Madrida Esperanto-Liceo. Atocha 98-4º. 28012 Madrido.

Miguel Fernández prezentis en RNE sian verkon "Sanga Nupto kaj la domo de B.Alba". Li par lis pri Lorca kaj propagandis Esperanton.

interese Georgo Kamaĉo prelegis pri sia vojaĝo al Libio, invitita de la Libia Estraro, Dum unu horo kaj duono la rondanoj aŭskultis pri la vivo, politika kaj moroj de tiu araba popolo.

Jam aperis la dua volumo de "Analoj de Hispana Esperanto-MOvado" verkita de Antonio Marco. Oni povas aĉeti en nia sidejo (1.600 pes, iome pli kosta ol la unua volumo, 1.200 pes.)= La libro ne devas manki en biblioteko de hispanaj esperantistoj.

Mary Luz González kiu nun laboras en Ancona (Italio) sendas salutojn al ĉiuj liceanoj en sendita letero.

Madrido kaj ĝia munumenta ĉirkaŭaĵo.- La Ministerio pri Turismo eldonis broŝuron pri Madrido en Esperanto. La tradukko estas farita de Georgo Kamaĉo, Rikardo F. Albert kaj Miguel Angel Sancho. La korektado estis farita de Juan Carlos Ruiz kaj Lupe Sanz. La eraroj en la kovrilpaĝo: "sia" anstataŭ "ĝia" kaj "ĉirkañaĵo" anstataŭ "ĉirkaŭaĵo" estas afero de Lupe. (kaj eventuale aliaj enaj eraroj). La Ministerio sendos ekzemplerojn al la hispanaj esperantaj grupoj, vi povas peti ankaŭ al HEF aŭ al Madrida Esperanto-Liceo kontraŭ unu interna-responkupono. Bv. ne petu al Ministerio.

La venontan 25-an de januaro, lundon, okazos en Atocha 98-4º, la GENERALA ASEMBLEO DE MEL, je la 19,30 h. laŭ la jenaj punktoj:

1.- Aprobo aŭ malaprobo de la antaŭa protokolo.
2.- Resumo de aktivaĵoj de MEL dum 1987. (legu Nia Voĉo decembro 1987)
3.- Bilanco 1987. (Oni aperas en tio-ĉi numero)
4.- Buĝeto 1988
5.- Venonta programo de MEL
6.- Elekto de novaj estraranoj
7.- Demandoj kaj komentarioj.

Ni petas al ĉiuj ilian ĉeeston ĉar MEL trapasa malbonan momenton okaze de la foriro de Madrido de gravaj esperantistoj.

La sekretario de LKK.- 47-a Hispana Kongreso. sendis kongreslibron, poŝtkartojn kaj kongreskartojn al ĉiuj kongresanoj kiuj ne venis al Madrido dum la pasinta kongreso. Kiel oni anoncis en la unua bulteno la libro de Lorca, donacita de MEL, nur estis por kongresanoj kiuj partoprenis en la kongreso.

La kursoj kiuj organizis Dennis Keef sukcesas dank' al lia laboro (propagando, instrua gvidado de la Liceo, ktp.) kaj malgraŭ la malgranda helpo de la liceanoj. La unuaj 6 gelernantoj jam finis siajn 4 semajnajn (3 h. tage) kaj ili jam parolas sufiĉe flue. Carmen Suarez kaj Pedro Carrote ankaŭ instruis Bazan Kurson 1, sed bedaurinde nur 2 lernantoj venis. Dennis ankaŭ komencis intensega kurso (8 h. tage dum 2 sabatojn), 5 gelernantoj, kaj 8 tagoj, 8 horoj (11 gelernantoj). Novaj kursoj malfermiĝos ankaŭ en januaro. Inter ili, troviĝos elementaj kursoj kun fina ekzameno kaj mez-grada kurso (kiun eĉ multaj malnovaj esperantistoj bezonas).Tiu ĉi lasta kurso okazos po du horojn unufoje semajne dum 10 semajnoj. Estas ankaŭ antaŭvidita konversacia kurso dum 5 semajnoj, po du horoj semajne.
Ne necesas substreki la gravecon de la laboro de Dennis por Esperanto kaj por la Liceo.

**Eŭropa Movado:** Lastatempe fondiĝis Eŭropa Federacia Esperanto-Asocio, kiu celas progresigi la unuiĝon de Eŭropo kaj la uzon de Esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj eŭropanoj. El praktikaj motivoj EFEA limiĝas je la 21 landoj de la Eŭropa Konsilio (Strasburgo). Por detaloj, membriĝo skribu al P.H. van Terwisga, Dorpsstraat 33, NL-8899 AB Vlieland, Nederlando.

Membro-kampanjo 1988.- Bonvolu ne forgesi renovigi vian aliĝon al la Liceo por 1988. La kotizo esta 1.800 pes.jare aŭ 150 pes. monate.

Ĝis revido.- Per tiu ĉi lasta numero la provizora redaktoro fermas sian deĵor-periodon kaj transdonas la torĉon al nova redaktorino, provizore Lupe Sanz. Post naŭjara restado en Madrido, Ges-roj Pighiera ek de februaro definitive translokiĝos al Torino (Italio).Ili tutkore dankas la membrojn de la Liceo pro ilia amikeco kaj certigas ilin pri daŭra rememoro.

Prelego pri Lorca.- La anoncita prelego de Miguel Fernández en la Ateneo pri sia traduko en Esperanto de du verkoj de Lorca havis grandan sukceson. Ĝin ĉeestis ankaŭ la fratino de la forpasinta poeto.

Ĉu daŭrigi la bufedon?.- Jam de kelkaj jaroj enkondukiĝis la kutimo organizi ĉiun trian lundon de la monato, en la Liceo, libera bufedo, konsistanta el manĝetoj kaj trinkaĵoj alportitaj de la membroj.Ĉar en la lastaj monatoj preskaŭ ĉiuj forgesis kontribui al la bufedo, estiĝas la demando, ĉu estas konsilinde daŭrigi la aranĝon?.

Hispanaj lernolibroj en Japanio.- "Nuevo método de Esperanto" de F. de Diego, membro de la Akademio de Esperanto kaj tradukinto de "Don Kiĵoto", ne nur estas la plej vendata hispanlingva lernolibro de Esperanto en Hispanio kaj Latin-Ameriko, sed enkondukiĝis ankaŭ en Japanio. Fakte, japana Esperanto-Asocio ĵus mendis 20 ekzemplerojn de la dirita lernolibro kiu estas survoje al elĉerpiĝo.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98. MADRID - 28012

Liceo




EL ADELANTADO DE SEGOVIA.—Pág. 15 JUEVES 17 DE DICIEMBRE DE 1987




EL ADELANTADO DE SEGOVIA.—Pág. 15 JUEVES 24 DE DICIEMBRE DE 1987




EL ADELANTADO DE SEGOVIA.—Pág. 15 JUEVES 31 DE DICIEMBRE DE 1987



Bone malmone gravas ke eksteresperanta gazetaro parolu pri E-o. Saluton, Cezar

Feliĉan Novan Jaron 4-1-88

AVANCE DEL EJERCICIO 1987 (se incluye todo el movimiento en cuenta de B.Atlántico hasta 28 de diciembre de 1987)

Queda pendiente el ingreso de Lotería y otros que se incluyen en la columna denom
nada Provisional

| | |
|---|---|
| Saldo a 31-12-1986...... | 727.185 pts |
| a plazo fijo ....... | 150.000 " |
| | 877.185 pesetas |

| Gastos | | (Provisional) |
|---|---|---|
| Alquiler................ | 179.319 | 16.192 |
| Teléfono .............. | 25.513 | (1) |
| Luz .................... | 10.668 | (1) |
| Material oficina/sellos. | 2.148 | |
| Suscripciones/Cuotas MEL | 9.821 | |
| Devolución cuotas socios | 3.778 | |
| Compra de libros ....... | 103.305 | (8) |
| Curso "EK" ............. | 25.000 | (1) |
| Mantenimiento/Calefaccion | 19.710 | (1) |
| Compra objetos venta ... | 30.038 | |
| Pago reintegro Loteria86 | 185.480 | (2) |
| Loteria 1987........... | 1.616 | 19.000(3) |
| 47º Congreso de Esperant. | 118.284 | |
| Varios ................. | 260.122(4) | |
| Viaje a Varsovia ..... | 1.080.418 | |
| Edición libro Lorca ... | 306.284 | |
| Total gastos | 2.361.504 pesetas | |

| Ingresos | | (Provisional |
|---|---|---|
| Intereses banco .......... | 19.465 | |
| Teléfono ............... | 435 | |
| Donativos ............... | 250 | 500.000 |
| Subvenciones ............ | 250.000 (4) | |
| Cuota socios ............ | 150.950 | |
| Venta de libros .......... | 151.738 | 56.400 |
| Venta de objetos ......... | 40.234 | |
| Lotería 1987 ............. | 59.593 | 31.300 ( |
| 47º Congreso de Esperanto. | 129.000 | |
| Varios .................. | 5.438 | |
| Viaje a Varsovia ...... | 1.080.418 | |
| Total ingresos | 1.887.521 pesetas | |

(1) El curso "EK" aumentará los gastos de teléfono, luz, calefacción y propaganda
(2) Se pagó el reintegro a casi el 50 % de las papeletas jugadas
(3) 17.000 de imprenta talonarios + 2.000 jugado por Liceo
(4) 250.000 de Subvención M. Cultura a MEL metidas a plazo
(5) Pendiente de cobro 6.400 de Platas y 50.000 de M.Gutierrez Adúriz (100 "Sentempa Sinfon
(6) En espera de donativo de Miguel Fernández procedente de subvención libro Lorca.
(7) Pendiente de cobro 25.000 de Juan Carlos Ruiz, 5.000 de Julio, 1.300 de Caja, etc.)
(8) Pendiente de pago a M. Gutierrez Adúriz de varios Sferoj.

El ejercicio 1987, hasta 28-12-87, ha producido saldo de -473.983 pts

| | |
|---|---|
| Saldo a 28-12-1987 en c/c ....... | 253.202 pesetas |
| Imposiciones a plazo : | |
| | 150.000 " |
| | 250.000 " |
| SALDO A FAVOR DE M.E.L............ | 653.202 pesetas |

**Publikaj kantoj en Esperanto.-** La ĥoro de la Esperanto-Liceo kiu direktas Pedro Vilaroig, ludis tre sukcese en la salono de Caja Madrid. Vere "Verda Stelo" jam brilas.

Ankaŭ partoprenis nia ĥoro en konkurso kiu okazis en la Urba Teatro de Placo Colón. Ĉiaj kantoj en Esperanto estis tre rimarkataj kaj priparolitaj eĉ en radio-elsendo.

---

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

Lundon, 4-an de januaro 1988....... Konversacia rondo

Lundon, 11-an de januaro ........... "Akuzito Nicolo Machiavelli, ekstaru!" prelego de G.C. Fighiera.

Lundon, 18-an de januaro ........... Antaŭ asembleo kunveno

Lundon, 25-an de januaro ........... **GENERALA ASEMBLEO DE MEL**

La kunvenoj komenciĝos je la 20-a horo en Atocha 98-4-a etaĝo.

Venontaj paroladoj: "Komputila tradukado" Juan Carlos Ruiz
"La filozofio de Kant" R.F.Albert
"Flamenco, kanto kaj danco". Pepe Platas.

---

## INFORME ECONOMICO DEL EJERCICIO 1987

A vuelta de hoja se publica un AVANCE del ejercicio de 1987 (movimiento en cuenta corriente hasta 28-12-1987). Lamentablemente y por sacar a la luz este número de NIA VOĈO lo antes posible, no hemos podido incluir el balance definitivo que se presentará en la próxima asamblea general del día 25 de enero.

De este avance destacamos lo siguiente:

Los gastos fijos de MEL (unas 20.000 pts/mes) estan escasamente cubiertos con los ingresos fijos ( cuotas + lotería) por lo que es necesario seguir con la política de petición de subvenciones y no dormirse en una economía boyante (posiblemente superaremos el millón de pesetas)

Es fundamental pensar en como emplear al menos la mitad del superhabit. El re o debe de meterse a plazo para que siempre haya un fondo para imprevistos. Las posibilidades, entre otras, pueden ser:

a) Edición de un li . Está en estudio uno de originales en Esperanto en el que se invitaría a colaboradores de todo el mundo, en especial jóvenes.

b) Comprar un ordenador, se puede ofrecer los servicios a HEF para control de pagos, revista, directorio, etc. Es muy importante que alguien se quiera hacer cargo de él, tal vez se le pagaría algo por parte de HEF.

c) Propagando: Camisetas, cerillas, etc.

d) Video en español sobre Esperanto para difundir en escuelas, videos comunitarios etc.

No olvides que la Asamblea General del Liceo es el día 25 de enero a las 20.00 h.

Organo de Madrida Esperanto Liceo 100 Ekzempleroj
Februaro 1988

Ni informos pri la Generala Asembleo en venonta numero

.- La 44-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Zagrebo (Jugoslavio) ekde la 16-a ĝis la 23-a de julio.

.- Dum la pasinta monato vizitis la Liceon S-ro Prinz, esperantisto el Norvegio.

.- Augusto Casquero petis per "Heroldo" informojn kaj materialon por fari doktorigan tezon pri esperanta temo. Eble vi povas helpi lin. Sukceson!.

.- MEL kontribuis per la modesta sumo de 1.000 pes. al la starigo de monumento al D-ro. Zamenhof, okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto. La monumento situos ĉe strato "Ronda Zamenhof" en Sabadell, la unua strato dediĉita al D-ro Zamenhof en la mondo.

.- 12-a HEJS-tendaro. 31-a mardo ĝis 4-a de aprilo (Paŝko). Monistrol de Montserrat. Trajno ĝis Martorell kaj de tie preni ferrocarrils de la Generalitat ĝis Monistrol. Junulara esperantista restadejo: strato Cami del Pau s/n. Bv kumportu dormosakon.

.- La eksprezidantino de la Liceo, Lupe Sanz BUeno, verkis teatraĵon por infanoj, kiu estis,tre sukcese,ludita en Madrido pasintan decembron.

.- La membroj de Madrida Esperanto Liceo adiaŭis ges-roj Fighiera la venontan 7-an de februaro (dimanĉo). Ni havos komunan tagmanĝ-bankedo. Se vi estas interesita,bv, telefonu lunde al la Liceo.

## VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

.- ĉiuj lundoj je la 19.00 h.en la sidejo de MEL KONVERSACIA RONDO

Eble lundon, 8àn de februaro prelegos Gian Carlo Fighiera:"Akuzito Nicolo Machiavelli, ekstaru!"

Venontaj prelegoj: marto, Juan Carlos Ruiz "Komputila tradukado"
aprilo, R.F. Albert "La folozofio de Kant"
majo, Pepe Platas "Flamenko, kanto kaj danco"

Redaktis, tajpis kaj eraris: Lupe
Ekzempleroj: 175

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Marto 1988

VIVO EN LA LICEO

-- La urbestro de Madrido respondis nian peton rilate la straton D-ro. Zamenhof en Madrido (vidu antŭan numeron de Nia Voĉo): Jam ekzistas strato dédiĉita al Esperanto kaj ili havas grandan atend-liston kun diversaj nomoj. Momente ni ne havos straton nomitan D-ro Zamenhof.

-- Ni petas al ĉiuj membroj de MEL, kiuj ne pagas sian kotizon per banko, ke ili pagu rekte en la Liceo la tut-jaran kotizon: 1.800 pes. Dankon!.

-- La pasintan 22-an de januaro prelegis ĉe ONCE S-ro Angel Figuerola Auque pri "Impronta del primer centenario del invento del Esperanto. Ilustres pioneros ciegos del movimiento esperantista internacional". Bedaŭrinde la programo atingis malfrue la Liceon kaj ni ne povis anonci ĝin en nia bulteno.

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

La konversacia rondo okazos ĉiun lundon je la 19.00 horo (sepa vespere)

Lundon, 7-an de marto "Flamenko: kanto kaj danco" Prelego de José Francisco Platas.

Venontaj prelegoj:
4-an de aprilo: "La filozofio de Kant" R.F. Albert
Majo: "Komputila tradukado" J.C. Ruiz

-- MEL aĉetis por sia biblioteko la kasedan kurson de Esperanto "Assimil". Ĝi estas por franc-parolantoj kaj havas 4 kasedojn kaj unu libron.

-- Video kasedo de nia ĥoro. S-ro Figuerola donacis al MEL videon de la programo de la ĥoro "Verda Stelo" en Jardines de Cecilio Rodriguez dum la pasinta Hispana Esperanto-Kongreso de Madrido. La direktoro de "Verda Stelo", Pedro Vilaroig, tre dankas al S-ro Figuerola ĉar li opinias ke la filmita programo estas unu el la plej bonaj el la ĥoro.

-- Cesar Mosteyrín aktive instruas Esperanton en Segovio, kelkfoje siaj gelernantoj partoprenas en nia rondo kaj li mem venas el Segovio por praktiki Esperanton ĉe ni. Li skribis artikolon pri Esperanto en la bulteno "La Neĝejo" de la Montara Grupo de Segovio.

-- Jam foriris ges-roj Fighiera al Italio, vere en Madrido ni havas krizon de gravaj esperantistoj; unue Augusto kaj Alicia, poste Ana kaj nun Ada kaj Gian Carlo. Kelkaj membroj de MEL kaj de la grupoj de Segovio, Valladolido kaj Valencio, adiaŭis per bankedo ges-rojn Fighiera kaj kiel memoraĵon de sia restado en Madrido (Hispanio) ili ricevis memor-platon kun jena gravuraĵo:

"Al Ada kaj Gian Carlo kiuj saĝe majstris kaj varme amikis ĉe ni"
Madrida Esperanto-Liceo 1988

-- Kursoj de Esperanto en Madrido

BAZA: Federación Española de Esperanto. Rodriguez San Pedro 13-3º. P-rino.Lucrecia San Antonio. Mardo kaj vendredo: 19,00 h.
: Amigos de UNESCO.Plazo Tirso de Molina 8.P-ro.Juan Navareño.Jaŭdo:19,00h.

MEZA: Madrida Esperanto Liceo. Atocha 98-4º. P-ro. Dennis Keefe.

-- Libroservo Madrida Esperanto Liceo
Ni sendas,remburse plus sendo-kosto, jenajn librojn:

| | |
|---|---|
| * Sanga nupto | 1.200 pes. |
| Astura bukedo | 650 |
| * Sentempa simfonio(poezio | 650 |
| Familio de P. Duarte | 650 |
| * Parolu Esperanton | 600 |
| Esperanto 1 | 650 |
| Paŝoj al plena posedo | 750 |
| * Blua hundo | 100 |
| Diccionario Sopena | 425 |
| Analoj de hispana E-o movado 1 | 1.300 |
| " " " " 2 | 1.600 |
| Nuevo Método de Esp: de Diego | 700 |
| Pandemonio | 900 |
| Diccionario Tudela | 700 |
| Gramatica Soler | 650 |
| Homa vivaventuro | 950 |

* Publikita en Madrido

## H I S P A N I O

-- LKK de 48-a Hispana KOngreso de Esperanto atingis subvencion de Generalitat Valenciá por eldoni antologion de Miguel Hernández trudukitan de M. Fernández Martín, nova Prezidanto de MEL.

## E K S T E R L A N D E

-- Laborbrigado en Bulgario.- BEA-urbo Pleven- organizas, ekde la 1-a ĝis la 25-a de aŭgusto, Internacian Esperanto-Junularan Laborbrigadon por popularigi la ligvon. La baza laboro estas arkeologia fosado apud vilaĝo Gigen. Oni laboras ĝis tagmeze. Se vi estas interesita skribu al adreso: Laborbrigado 88/ Str. "C Cerkovski" 14/ Bulgario, 5800 Pleven.

-- 12-a Internacia Junulara Festivalo de Itala Esperantista Junularo. Castiglione del Pepoli (Bologna) 30-03/ 05-04-1988."Del Odiseo al Kosmoŝipo: Esplorado de novaj mondoj."

---

K A J D U M P A S K O Tendaro de HEJS en Monistrol de MOntserrat

" E N J U L I O 48-a Hispana KOngreso de Esperanto. Valencio.

---

MADRIDA ESPERANTO-LICEO

NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO

Aprilo 1988

Redaktis, tajpis kaj erarigis: Lupe Ekzempleroj: 175

VIVO EN LA LICEO

S-ro Ballester skribis leteron al MEL, li gratulas al ĉiuj por la streĉitaj fortoj faritaj rilate la tut-jaran agadon en 1987. Li opinias, ke estas fundamenta la peto de subvencioj kaj la "organizata aktivado". Dankon Arquímedes por via tutkora letero

La Japana grupo de la urbo Hino dankis al MEL sian kontribuon en la kultura festo okaze de la Centjariĝo de Esperanto. Ili ricevis leteroj de 11 landoj kaj tradukis en japanan lingvon la senditan materialon pri atom-elektrejo. Ni dankas la senditajn fotografaĵojn de la ekspozicio.

Liceanoj bv. pagu vian jar-kotizon jam nun vi multe faciligos nian laboron

Bultenoj/revuoj ricevitaj ĉe MEL

Abonoj: Monato, El Popola Ĉinio, Heroldo, Esperanto, KOntakto, Boletin HEF, HEJS Bulteno, TEJO Tutmonde.

El hispanaj grupoj: Heleco (Astura), Monate ĉe vi (Andaluzia), Kultua Asocio-Esperantisto (Kataluna), Gazeto Andaluzia, Valencia luno, Hela Hirundo, La Grilo, Bulteno Antón Balaguer, Fido kaj Espero, Libera Tramo.

Internaciaj: La espero el Koreujo, Bulgara Esperantisto, Sano, k.t.p.

Vi povas legi ilin en la Liceo

Esperantaj kursoj en Madrido

Baza: HEF.Rodriguez San Pedro 13-3º.Mardo kaj vendredo. 19,00 h. (4 gelernantoj)
MEL. Atocha 98-4º. (4 gelernantoj)
UNESCO. Plaza Tirso de Molina 8. Jaúdo. 19,00 h.
Centro Cultural Maestro Alonso 6. Merkredo kaj jaúdo. 18,00

Meza: MEL

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

11-an de aprilo ... Prelego "711, ĉu araba invado?" Rikardo F.A.R.
18-an de aprilo → Projekcio de filmo "ESPERANTO". Hogar del Pensionista. strato Jacinto Verdaguer (Puente Toledo). 18,30 h.
9-an de aprilo ... SABATO. Ekzkurso al "Mamoj de Viana (Guadalajara)" Foriro je la 9.00 h, Metr Avenida de America, Veturile.
Majo (9-an) ...... Prelego "Automata tradukado" J.C. Ruiz
Junio (6-an) ..... Poezio de Miguel Hernández".Miguel F.

Konversacia rondo okazos je la 19,00 h. en Atocha 98-4º, lunde

Miguel Angel Sancho jam finis sian milit-servon. Ni bonvenas lin al nia konversacia rondo kaj al la aktiva vivo de la Madrida Esperanto-movado.

Pepe "El Platas" tre sukcese prelegis pasintan monaton pri la hispana kanto "flamenco" kiel bon-konatanto de la temo. Ni povis aŭskulti kasede diversaj "palos" de la "honda" kanto.

## HISPANIO

Malago.- Radio Benalmádena (SER) elsendas programon pri Esperanto semajne

28-a Internaciaj Floraj Ludoj.- Kataluna Esperanto-Asocio organizas kiel kutime konkurson de verkoj (poemoj, noveloj, fabeloj, k.t.p.) originalaj aŭ tradukitaj. Sendu ĝis la 30-a de aprilo al Juan Ramón Guiñón i Roset, carrer Vilamari 106-108. 08015 Barcelono.

Nova Esperanto Asocio.- HALE (Hispana Asocio de Laboristaj Esperantistoj) kies sideo troviĝas ĉe strato Gral. Primo de Rivera 6-03360 Callosa de Segura (alicante)

Deputito esperantista.- S-ro. Emilio Gastón, el Zaragozo, estas deputito en la hispana parlamento kaj "Justiciulu de Aragono", ekvivalenta al ŝtata "Defensor del Pueblo"

PIV suplemento.- Jam aperis novan eldonon de PIV, se vi deziras aĉeti nur la suplemento vi povas peti ĝin al Libroservo de HEF po 624 pes.

HEJS Tendaro 31-a marto ĝis 4-a de aprilo en Ministrol de Montserrat (Barcelono)

## INTERNACIA

Blancanieves.- Hungara film-reĝisoro proponas fari videon en Esperanto de la 10 plej konataj internaciaj filmoj. La unua estos "Neĝulino kaj la sep nanoj"

Ĉu vi scias ke la vic-prezidanto de la seula Olimpiaj Ludoj estas la Prezidanto de Korea Esparanto Asocio?

Kiom da esperantistoj estas en la mondo nuntempe?. Laŭ statistico farita de Bernand Golden jenaj:

Adeptoj pli ol .................. 5.650.000
Finis kurson pli ol ............ 565.000
Skribas kaj parolas esperante malpli 56.500
Korekte skribas kaj parolas malpli ol 5.650
Verkas aŭ tradukas malpli ol..... 565

Korea Turisma Korporacio agnoskis Esperanton kiel tradukan lingvon. Ĝi tial nomis 28 esperantistoj en Seulo honoraj interpretistoj.

NE FORGESU........... NI KUNVENAS ĈIU LUNDO JE LA SEPA VESPERE

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº98. MADRID - 28012

NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto Liceo Majo 1988
Redaktas, tajpas kaj erarigas:Lupe

---

## V I V O   E N   L A   L I C E O

Nia bibliotekistino Pilar jam reordigis la Bibliotekon de MEL ne bone organizitan dum la pasinta jaro. Ni esperas ke baldaŭ oni povos pruntedoni kelkajn librojn al kutimaj partoprenantoj en konversacia rondo kaj samtempe membroj de MEL

Grava inundo.- La biblioteko de MEL suferis gravan inundon ĉar pluvis kun malfermita fenestro. Kelkaj libroj,kiuj ne estis en siaj lokoj,akvumis. Ni petas al legantoj lasi ĉiam la libroj en siaj libro-breto. La biblioteko de MEL havas proksimume 700 librojn, kelkajn jarkolektojn de internaciaj revuoj, afiŝojn de naciaj kaj internaciaj kongresoj kasedojn de kursoj kaj kantoj, video-kasedojn, turismajn broŝurojn en Esperanto, propagandon pri Esperanto kaj kuriozaĵojn pri Esperanto (botelojn de "Mirinda", artikolojn de ĵurnaloj kaj revuoj, muzik-partiturojn, k.t.p.), ni devas konservi ĉiun materialon.

Kristnaska loterio 1987 .- Finfine ni jam scias la profiton: 99.227 pes. Ni esperas ke venontjare estos pli bone organizita kaj ke ĉiuj pagos sian bileton antaŭ la lotado. MEL donos al sia ĥoro 10.000 pes. kiam ili pagos la buson por iri al Roterdamo aŭ alia esperanta-aktivaĵo.

Literatura kurso.- Ekde la 6-a de aprilo ĉiu-merkrede okazas (ĝis fino de junio) speciala literatura kurso por esperanto-parolantoj, gvidas M. Fernandez laŭ la libro "Paŝoj al plena osedo".

Konversacia kurso.- Kiel parto de MEK-kurso (mez-nivelo de la metodo de Dennis) Rikardo instruas ĉiun mardo en la Liceo, je la sepa vespere.

Donaco al MEL .- Kiel estis anoncite pasintjare, Miĉjo donis al MEL subvencion de Ministerio pri Kulturo al la traduko de sia libro "Sanga nupto" kaj la "Domo de Bernarda Alba" La kontoj estas jenaj: Subvencio 500.000 pes. Impostoj de eldonisto:25.000. Enspezo de MEL:475.000 (poste MEL devas pagi al Miĉjo sian imposton)

Madrida Esperanto Junularo (MEJ).- Eble multaj membroj de MEL ne scias ke ekzistas MEJ kiel grupo de HEJS (Hispana Esperanto Junulara Societo kaj la junulara sekcio de Hispana Esperanto Federacio). HEJS estas federacio kiu, ĝis nun, enkalkulas kvin grupojn (Valencio, Katalunio, Aragono, Madrido kaj Andaluzio), ĝi eldonas du revuojn (HEJS-Juneco kaj LA MANO). MEJ konsistas el 4/5 uloj kaj pro diversoj kialoj (studoj, milit-servo, laboro) ili ne aktive laboras aŭ partoprenas en esperanta-aktivaĵoj organizataj ĉe MEL. Sed kiel ni kredas, estonto de Esperanto estas en junularo kaj MEL bezonas helpon de MEJ almenaŭ por vidi junajn esperantistojn en nia sidejo.

## V E N O N T A J   G R A M O J

| | |
|---|---|
| 1-an/2-an de majo.......... | Ekzkurso al Fantomujo. Pliaj informoj en konversacia rondo 25-an de aprilo. |
| 9-an de majo .............. | Prelego "Automata tradukado".Miguel Angel Sanch |
| Junio(6-an)................ | Prelego "Poezio de MIguel Hernández" |

ĉiu lunde, je la sepa vespere, okazos konversacia rondo en nia sidejo

18-an de majo → → merkredo

Ekde la 20-a de aprilo LUCRECIA SAN ANTONIO gvidas en Ateneo de Madrid, strato Prado nº 21. konkersacia rondo en Esperanto.
Ĉiu-tria merkredo. Monate. Je la sepa vespere.

**OPINIOJ** (Nova sekcio, vi povas sendi tajpitan duon paĝon kun viaj opinioj pri diversaj temoj, inkluzive ne esperantaj; ni korektos la tekston)

Hodiaŭ opinias Lupe. " La estraro de MEL, malgraŭ miaj klopodoj, decidis ne peti subvenciojn por 1988. Mi opinias ke estas eraro ĉar laŭ la buĝeto de MEL ni ne ricevas sufiĉe da mono el kotizoj kaj loterio,(la nunaj enspezoj de MEL, ĉar la vendado de libroj estas malgranda) por kovri la elspezojn (ni devas pagi monate pli ol 20.000 pes.).Oni devas pensi pri eventualaj elspezoj: nia sidejo estas malnova kaj se oni devas ripari ŝtuparon ni devas pagi ĝin, aŭ pensu pri specialaj esperantaj aferoj: MEL antaŭ-pagis la libron de Lorca per mono de antaŭaj subvencioj kaj nun, post unu jaro, MEL ricevis la monon de Ministerio pri Kulturo, ĉu ekzistas esperantisto kiu povas pruntedoni dum unu jaro 500.000 pes. sen interezoj?. Ĉu la libro ekzistus se MEL ne antaupagis la eldono? Mi pensas ke eble ne.

Kaj fine mi deziras diri, kiel laborulo por atingi subvenciojn lastajn jarojn ke estas facile atingi ilin kaj se la estraro decidis ne peti tiun-ĉi jaron, mi kredas ke ili devas elspezi nur laŭ la aprobita buĝeto kaj ne tuŝi rezerv-kvanton de antaŭaj subvencioj kiu oni devas uzi nur se oni petas kaj ne atingas mon-helpon.

La koruso de MEL petis subvencion al Ministerio pri Kulturo sed ekzistas aliajn oficialajn instancoj por MEL.

## OKAZAS EN HISPANIO

HEF en Extremadura.- S-ro González estas delegito de HEF en Badajoz, li petas helpon al ĉiuj esperantistaj grupoj (esperantaĵoj kaj mono). Ankaŭ li deziras fari propagandaj alumetoj kaj bezonas antaŭmendon de grupoj por fari grandan kvanton malmultekoste (7 pes.). HEF-Extremadura. Apdo 231. Badajoz.

Vojaĝo al Roterdamo.- Por partopreni en la U.K. Valencia Esperanto Grupo organizas vojaĝo autobuse.Valencia-Paris-Roterdam-Valencia (sen manĝoj) 29.400 pes.Telf:(9 )342-04-20

Valencia KOngreso.- (14-a ĝis 18-a de julio) Jam aperis unuan informilon kun ekskurs-programo. Bv. aliĝu kaj petu frue viaj ekskursoj por faciligi organizadon. Sendu mendilo al: Manuel Gargallo Monforte. Almudaina 13 pta.26.Valencio 46007

Ekskursoj:

| | |
|---|---|
| Peñíscola.......... | 1.490 pes |
| Sagunto-Valldux6 . | 600 |
| Almusafes-Ford ..... | 245 |
| Alboraya-Lladó ..... | 340 |
| Albufera ............ | 350 |
| Grandega "paella".. | 1.000 |

48-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

ESPERANTO
c/ ATOCHA nº98. MADRID - 28012

NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO

Redaktis: Lupe Organo de Madrida Esperanto-Liceo Junio 1988

## VIVO EN LA LICEO

Nia kara samideanino Emi feriis dum Pasko en Bulgario. Ŝi kontaktis kun membroj de Bulgara Esperanto-Teatro, kiuj sukcese ludis teatraĵojn dum la Madrida Jubilea Kongreso.

HEJS Tendado. Du membroj de MEL (Rikardo kaj lia fratino) partoprenis en la Monistrola renkontiĝo dum Pasko kune kun 31 gejunuloj (2 eksterlandanoj) kaj pluvema vetero. La partoprenantoj vizitis la famo monaĥejo de Montserrat, kies direktoro salutis ilin en perfekta Esperanto. La venonta tendaro okazis en Vitorio.

Leteroj recivitaj. Ni ricevis leteron el Ruslando, tie juna esperantisto, kies hobio estas heraldiko, petas hispanajn librojn pri tiu ĉi temo. Ni tradukis la leteron kaj sendis ĝin al Hispana Instituto pri Heraldiko kaj al nia kara Mamen, fakulino pri genealogio kaj heraldiko. Ankaŭ faka librovendejo oferis ŝanĝi librojn, ni estos perantoj por ĝi.

Ankaŭ D-ro Ulrich Lins el Germanio dankas al MEL pro la 47-a Kongreslibro, kie aperis la historio de Esperanto-movado en Madrido "Ĝi efektive prezentas bonan materialon por miaj studoj" diras S-ro Lins. Li preparas libron rilate la historion de Esperanto dum la lastaj jaroj.

48-a Hispana Kongreso de Esperanto.- MEL kunlaboras en la organizado de tiu ĉi kongreso. Nia Prezidanto estas membro de LKK kiel aranĝanto pri eksteraj rilatoj kaj ankaŭ kontribuis per sia verko "Antologio de Miguel Hernandez" subvenciita de Generalitat Valenciana

Purigado de la salono .- La membroj de la esperanta ĥoro "Verda Stelo", kiuj sabate provas ĉe MEL, purigis la salonon, eĉ sub la sofoj!!. Dankon al ili.

Eksterlandaj vizitoj.- Dum la lastaj semajnoj vizitis MEL tri esperantistoj el Brazilio, ili aktive partoprenis en nia konversacia rondo.

Dennis Keefe.- Post kelkaj semajnoj en Europo li revenis al Madrido por fini sian MEK-kurson. Li prelegis, estis intervjuita kaj organizis kursojn en kelkaj urboj de Francio, Nederlando kaj Belgio. Li tie konstatis, ke la oficiala ekonomia apogo ne estas sufiĉe por havi bonajn esperanto-parolantojn, oni bezonas ankaŭ bonan metodon kaj almenaŭ mez-bonajn instruistojn, aparte de taugaj gelernantoj (mez-kultur-nivelo)

Rikardo F.A.R. esperantigis artikolon pri atmosfera polucio el la hispana revuo "Mundo Cientifico nº 69", ĝi aperis en Heroldo de Esperanto.

### VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

| | |
|---|---|
| 2-an ĝis 5-an de junio ........ | Oni preparas ekzkurson. Ni decidos en konversacia rondo, tago 30-an de majo. |
| 6-an de junio (lundo)........... | Prelego de M. Fernández "Mia traduko de la poezio de Miguel Hernandez" |
| 15-an de junio (merkredo)....... | ĉe Ateneo (Prado 21) Lucrecia San Antonio gvidos konversacia rondo. 19.00 h. |

Lunde, je la sepâ vespere, okazos konversacia rondo en Atocha 98.

# Esperanto en la Internaciaj Brigadoj

Pro la ribelo de Franko kontraŭ la Hispana Respubliko, la 18-an de julio 1936, baldaŭ formiĝis antifaŝista; milicoj kaj en Barcelono, unu esperantista taĉmento partoprenis la batalon.

Komence de oktobro fondiĝis la Internaciaj Brigadoj kun volontuloj el 54 nacioj. Kiel solvi la lingvajn problemojn? Unue ekagis esperantista komisiono, kiun gvidis generalo J. Mangada kaj L. Renn, publicisto. En kelkaj lokoj troviĝis esperantistoj, kiuj anoncis sin kiel interpretistoj. Tamen, en la plej multaj batalionoj ne estis esperantistoj, sed granda nombro da franclingvanoj. Nur dum kelkaj semajnoj, la franca lingvo esti akceptita kiel staba militista lingvo. Poste, por interkompreniĝi kun la hispanoj, nepre necesis la hispana lingvo.

Aperis esperantlingvaj periodaĵoj — "La Informa Bulteno" kaj "Popola Fronto". Ili estis senditaj al diversaj landoj kaj lokaj esperantistoj tradukis la artikolojn por sia nacilingva gazetaro, kiu ofte uzis ilin. Nur la esperantistoj en la samaj brigadoj povis persone interrilatiĝi. Kontaktoj kun aliaj esperantistoj en aliaj brigadoj preskaŭ ne eblis, ĉar la distanco inter ili estis ofte kelkcent kilometroj.

## De 1939 al 1945

Post la malvenko de la Hispana Respubliko, preskaŭ unu miliono da hispanoj trapasis la francan landlimon. La Internaciaj Brigadistoj estis internigitaj proksime di Perpignan. Devis resti tie la germanoj, aŭstroj, bulgaroj, rumanoj, jugoslavoj...

En la barakoj interesuloj ricevis instru-materialon — helpe de francaj esperantistoj — kaj lernis Esperanton en kursoj por germanlingvanoj, jugoslavoj kaj italoj. Aktivuloj verkis pri ol 300 artikolojn pri la Internaciaj Brigadoj.

La 1-an de septembro 1939 komenciĝis la Dua Mondmilito kaj ĉiuj kontaktoj perdiĝis. La internituloj estis transportitaj al Gurs, Vernet kaj Montlouis.

La tiama franca registaro transdonis la germanajn kaj aŭstrajn brigadistojn al Gestapo, kiu transportis ilin al la koncentrejo de Dachau, apud Munkeno.

La 27-an de aprilo 1945 — kelkajn tagojn antaŭ la germana kapitulacio — Himmler ordonis al ĉiuj komandantoj de la koncentrejoj mortpafi la anojn de Internaciaj Brigadoj. En Dachau la rezista movado kaj solidareco savis ilin. Men ciindas, ke en tiu koncentrejo funkciis Esperanto Grupo kun aktivuloj el Aŭstrio, Jugoslavio, Pollando.

**(Laŭ "La Esperantista Laboristo"** Herolddo (1791) **F. Halderer)**

NI ATENDAS VIAJN ARTIKOLETOJN POR LA RUBRIKO"OPINIOJ"

OKAZAS EN HISPANIO

Venontaj hispanaj kongresoj:

| | |
|---|---|
| 14-a ĝis 18-a de Julio | VALENCIO |
| 1989 ........ | BILBAO |
| 1990 ........ | SANT CUGAT (BAR) |

3-a ĝis 6-a de Decembro okazos en Jerez la Andaluzia Kongreso , eble MEL organizos karavanon.

Nova eldono de SOPENA.- La fama vortareto hispana-Esperanta-hispana, estos baldaŭ reeldonota, pere de S-ro Josep Climent Grañana.

→ El Presidente de MEL invita especialmente a todos los miembros del Liceo a las tertulias en Esperanto que se celebran en el Ateneo (c/ Prado nº 21) todos los terceros miércoles de mes, a las 19,00 h (duran 1 hora) ←

Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
Julio- Augusto 1988
Septembro

VIVO EN LA LICEO

Sukceso en Ateneo.- Preskaŭ 20 personoj kunvenis en Ateneo de Madrido unu fojo monate (la trian merkredon). Dum majo la temo estis "traduk-arto" kaj tre aktive kaj interese partoprenis la rondanoj. Ni denove kunvenos la 21-a de septembro je la 19,00-a h. en la salono "Cacharreria" kaj kiel publika loko oni faros grandan propagandon de Esperanto.

Karavanon al Jerezo.- Ni anoncis karavanon el MEL por partopreni la 6-an Andaluzian Kongreson en Jerezo la venontan Decembron, sed nun ni legis en Gazeto Andaluzia aliajn datojn (13-a ĝis 15-a de Aŭgusto). Bedaurinde dum Aŭgusto MEL-anoj ferias sed eble ni vizitos karavane Andaluzion (Seviljon, Jerezon, Kordovon K.t.p.) dum la Decembra festoponto (3-a ĝis 6-a)

La sekvonta numero aperos en Oktobro

FELIĈAN SOMERON AL CIUJ

Internacia Fervojista Kongreso.- Juan Navareño partoprenis kiel kutime en la fervoja kongreso kiu okazis tiun ĉi jaron en Francio (Perpignan). Li aktive kongresis kaj parolis kun eksterlandaj amikoj.

Orĥestro kaj ĥoro.- La pasintan dimanĉon, la 12-an de junio oni prezentis publike la Esperantan Orĥestron "Verda Stelo". Ĝi ludis kvin muzikaĵojn kaj akompanis al la ĥoro en 2 kantoj.

Cesar vojaĝi.- Nia kara samideano el Segovio, Cesar de Mosteyrin, partoprenis en Itala Junul-kongreso en Castiglione dei Pepoli kune kun Manolo, unu el siaj gelernantoj el Segovio. Post la kongreso li grimpis en Barcelono la monton Sankt-Jeromin kaj ankaŭ eksploris en Palencjo la kanalon de Kastilio; finfine li faris la "vojon" dum la pilgrimado al Rocio ekde Sanlucar de Barrameda kaj poste li instruas Esperanton en Segovio kaj, kaj..... !Cesar estas emeritulo kiu havas bonan sanon, bonan humoron kaj bonan Esperanton ! Li ankaŭ desegnas dum siaj ekskursoj.

MADRIDO K-92. Nia urbo estos la Kultura Europa ĉefurbo dum 1992. MEL klopodos montri la Esperantan Kulturon dum tiu-ĉi jaro per prelegoj, recitaloj, eksposicioj, ktp. !Ni kalkulas kun viaj sugestoj kaj apogoj!

OKAZAS EN HISPANIO

48-a Hispana Kongreso en Valencio.- 14-a ĝis 18-a de julio. Kongresejo: Facultad de Ciencias Económicas y Empresariales. Loĝejo: (apud la kongresejo) Studenta restadejo "La Concepción" adreso: Av. de Suecia 23 Tel (96) 326-96-16. Tuta pensiono 1.700 pes Duonpensiono: 1.400 pes. Tranokto kaj matenmanĝo 1.200 pes.

Internacia KOngreso en Valencio.- (Lastmomenta informo) Laŭ informoj de UEA oni ŝanĝis la jaron, anstataŭ 1992 estos 1993

DUM JULIO ONI FAROS ne-formalan KONVESACIAN RONDON
MEL FERMOS EN AŬGUSTO KAJ DENOVE INAŬGUROS LA PROGRAMON
LA 5-an de Septembro POR PREPARI NOVAJN KURSOJN JE LA
KOMENCO DE OKTOBRO.

L A  G R A N D A  D I K T A T O R O

La monaton Junio la kvinan, oni, telesendis la filmon "/La Granda Diktatoro/". Ne estas okazo fari ĉi tie, kritiko pri filmo kie la aktoro kiel kutime, ne nur plenumis sian metion, sed ankaŭ estis la aŭtoro de la filmoskizo, kaj mi supozas aliaj aferoj en la filmo inter ili estas jenajn:



Kiam la aktoro en la ĉefrolo ludis kiel barbiro, okazas en lia kvartalo- en strato kiu en la la filmo aperas multfoje- la nomo de la vendejo aperas en nia kara lingvo Esperanto (Tio ne estis novaĵo por ni, ĉar jam de longe mi legis en ĵurnalo Esperanto pri la afero. Pro tio mi estis atento kaj kopiis diversajn el tiu nomoj: Barbir (mankas la o), sed en alia parto vertikale aperas ĉambroj, restorasiz (restoracio) kaj en frukto-vendejo diversaj afiŝetoj terpumoj (terpomoj) kaj rapoj sed la plej klara estis vestaĵon malnovan.

Pro tio mi kredas ke Charles Chaplin simpatias al Esperanto aŭ almenaŭ konas ĝin.

J. Arĝentoj

## Feliĉan Someron !

**nia voĉo**
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n°98. MADRID - 28012

## VIVO EN LA LICEO

Ĥoro "Verda Stelo".- La Madrida-Esperanta Ĥoro, kiu gvidas Pedro Villaroig, atingis du gravajn subvenciojn: 100.000 ptojn el Madrida Autonoma KOmunumo (Kultura Oficejo) kaj 75.000 ptojn el Madrida Urbodomo. Dank'al ili kaj al la invito de LKK de la Valencia Kongreso la ĥoro ludis en la lasta Hispana Kongreso kun granda sukceso kaj admiro de gekongresanoj. Ankaŭ la grupo kantis en la bapto de Victo E. Casquero, filo de Augusto kaj Alicia. Vere nia ĥoro estas matura por fari pliajn turnirojn.

Miguel Hernandez en Esperanto.- La Prezidanto de MEL prezentis sian tradukon "Miguel Hernández poeto de l' popolo" en la Valencia Kongreso. La bofilino kaj genepoj de la poeto prezidis la akton kaj, post la paroladeto de M.Fernández pri sia verko, la knabino deklamis kelkajn poemojn de ŝia fama avo. Oni povas aĉeti la libron ĉe MEL po 800 ptojn. !Legu kaj ĝuu la lulilkanto de la cepo en Esperanto!

MEL revizias sian membro-adresaron.- En tiu-ĉi numero de Nia Voĉo MEL sendas leterojn al ĉiuj (400) membroj (personoj kiuj iam aliĝis al MEL kvankam kelkaj el ili forgesis pagi sian kotizon). Ni deziras rekapti esperantistojn por fortigi la movadon en Madrido kaj samtempe profiti la leteron por korekti la adresaron.

Ni kalkulas kun via helpo. Se vi ricevas kutime Nia Voĉo vi estas en la "blanka listo" de membroj kiuj pli malpli pagas sian kotizon.

EL NUEVO METODO DE APRENDIZAJE DE ESPERANTO, DESARROLLADO POR UN LINGUISTA DE LA UNIVERSIDAD DE ILLINOIS, HA DEMOSTRADO SU GRAN EFICACIA DURANTE TODO EL ULTIMO AÑO !!!ANIMATE A APRENDERLO!!. Comienzo del curso el día 3 de octubre

C I R C U L A R

A: Todos los miembros de Madrida Esperanto-Liceo (MEL)
FECHA: Setiembre 1988

Liceo de Esperanto ¿Te suena?. Seguramente recuerdes algo de tu paso por la antigua sede de Atocha 98-4º.

Hoy, despues de algunos años tal vez, nos dirigimos a ti como miembro que fuiste de MEL. Con esta circular nos proponemos:

1.- Actualizar las direcciones de nuestros ficheros. Si en la tuya hay algún error avísanos por teléfono: 2-30-87-98

2.- Recuperar esperantistas que en otro tiempo fueron "miembros activos" del Liceo. Madrid, debido a su gran extensión, es una de las capitales de España con menor densidad de esperantistas activos.

Nos suponemos que, como todos, estarás muy ocupado y que reservar una tarde al Esperanto te puede costar un gran esfuerzo. A pesar de todo te animamos a venir los lunes de 7 a 9 de la tarde a nuestra tertulia en Atocha 98 o los terceros miércoles de mes a las 7 en el Ateneo (Prado 21).

3.- Solicitar tu ayuda para la difusión del Esperanto. Estamos en un momento cumbre en el que la Comunidad Europea se empieza a dar cuenta del problema del multilinguismo y nosotros tenemos una solución que ha funcionado durante 100 años.

Si de verdad estás a favor de una lengua neutral internacional, si estas cansado de que te metan el inglés hasta en la sopa... te pedimos que nos ayudes a propagar el Esperanto ¿Como?

En primer lugar aprendiéndolo (nuestro próximo curso comenzará el próximo día 3 de octubre a las 18,30) y si puedes ayudándonos a hacer publicidad: reparto de folletos entre tus amigos y compañeros, pegada de carteles, facilitar contactos en radios y periódicos, etc.

Te adjuntamos un ejemplar del cartel que anuncia nuestros próximo curso, si puedes,te sugerimos que hagas algunas copias y las repartas o coloques en lugares visibles.

4.- Requerir tu ayuda económica volviendo a ser socio "de hecho" del Liceo. Esto no es lo más importante para nosotros pero inevitablemente el Liceo tiene unos gastos de alquiler, luz, teléfono, etc. que ha de cubrir, por ello es menester contar con una financiación mínima: 1.800 pts al año es la cuota actual.

La Lotería de Navidad nos es de gran ayuda, si puedes encargate de vender alguna participación. Llámanos al teléfono 2-30-78-98 los lunes de 7 a 9 y te lo haremos llegar de alguna forma.

Con el deseo de verte nuevamente por el Liceo te saluda

LICEO DE ESPERANTO ATOCHA 98 MADRID-12

Miguel Fernández
Presidente de MEL

Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4º
28012 Madrido
Novembro 1988

## NOVA FAKA E-ASOCIO

Okaze de la 48-a HEF Kongreso en Valencio la hispanaj SAT-anoj fondis novan Esperanto-organizon, HALE (Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistoj), aperta al ĉiuj samideanoj interesataj pri disvastigo de Esperanto en laboristaj medioj. La prezidanto de Madrida Esperanto Liceo kune kun samideano Marco Botella, el Zaragozo, okupiĝos pri la redaktado de "Kajeroj el la Sudo", la organo de HALE.

## GRAVA TUTLANDA ESPERANTO-KUNVENO EN MEL

La 22-an de oktobro ekde la 10-a matene kaj sub la gvido de profesoro Alonso Nuñez, el Santiago de Compostela, havis lokon en nia sidejo grava tutlanda kunveno, en kiu oni analizis la krizan situacion trapasatan de la hispana Esperanto-movado. Kvankam la nunaj momentoj malfacilas por nia movado, ne mankas entuziasmaj homoj, pretaj laŭiri novajn vojojn, krei freŝaerajn trablovojn ene de HEF. Pri la proponitaj praktikajn solvojn ni informos en venonta numero .

## LA LICEO ELIRAS EKSTERDOMEN

De la 27-a de Septembro al la 2-a de Oktobro en PUENTE DE TOLEDO sub la nomo "Planetaria" (Festival Nueva Era 1988) la Madrida Urbodomo okazigis foiron de alternativajn grupoj. En tiu foiro la Liceo disponis je propra stando, kaj, kompreneble, oni kaptis la okazon por diskonigi niajn librojn, revuojn kaj afiŝojn, klarigi demandojn pri niaj lingvo kaj celoj kaj enmanigi propagandprospektojn. Rimarkindas, ke la ekzemplero de "Asteriks la Gaŭlo" kaŭzis sensacion inter la gejunuloj.

## ESPERANTO, PORPACA LINGVO

Esperanto konsistigos la libron "Kvindek ideoj por la paco", eldonata de la Madrida Urbodomo.Tincele, kelkaj membroj de la Liceo skribis dosieron informantan pri la intimaj rilatoj inter la internacia lingvo kaj la mondpaco kaj, ĝenerale, pri la universala Esperanto-movado

## KURSOJ

Malgraŭ la granda gluado de afiŝoj por propagandi nian baz-kurson laŭ la "denisa" metodo, ĝi fiaskis, nur venis 3 gelernantoj kaj MEL decidis ne komenci. Oni analizis la kialojn kaj ni alvenis al la konkludon ke la dato, komenzo de Oktobro, ne estas taŭga ĉar samtempe oni anoncas multaj kursoj kaj la afiŝoj estas gluataj nur horoj. Aparte la prezo (3.000 pes.) kaj la amasa kultura ofero kiun havas Madrido.

Perfektiga kurso (konversacio, literaturo, Esperanto-movado) okazos ĉe MEL, lunde je la 18,30. La profesoroj estos M. Fernández kaj R.F.Albert.

### VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

Ciu lundo okazos konversacia rondo en nia sidejo. Atocha 98-4º, je la 19,00 horo.

Lundon, 21-an de novembro. PRELEGO (Kun sonbendoj) "Moderna Esperanta muziko".R.Albert

Merkredon,16-an de novembro.Konversacia Rondo ĉe Ateneo de Madrid. Prado nº 21.

Decembro: Prelego "Miguel Hernández vivo kaj verkaro"
ZAMENHOFA FESTO. 17-an de decembro.kun oficiala prezentado de orkesta "Verda stelo"

## GRAVAJOJ IMPORTANTE

1.-EL NUMERO DE LOTERIA QUE JUEGA EL LICEO ES EL 0 9 3 5 7 te esperamos para que juegues con nosotros y para que nos ayudes a vender.

2.-PARA ASISTIR A LA CENA DEL DIA DE ZAMENHOF HAY QUE HACER RESERVA

NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO NIA VOĈO
Redaktis: Lupe
Organo de Madrida Esperanto Liceo
Decembro 1988

VIVO EN LA LICEO

Renoviĝo en nia sidejo.- Pedro Garcote kaj Pepe Platas, dum la monato Aŭgusto, aranĝis la necesejojn de MEL. Ili gluis novajn murpaperojn kaj pentris la plafonon kaj plankon. Feliĉe oni povas necesumi trankvile en bela loko!!

Nacia Loterio.- Kiel vi scias Loterio esta unu el niaj monfontoj. Por sukcesi ni bezonas vian helpon, precipe por vendi biletojn. Se vi deziras aĉeti biletojn (po 100 pes.) sendu ĉekon kaj ni sendos ĝin rapide. Vi povas ankaŭ sendi en koverto 500 pes bileton.

Leteroj ricevitaj.- Gian Carlo kaj Ada sendas el Italujo salutojn al ĉiuj geamikoj. Li laboras kiel konsultisto, profesoro kaj verkisto pri kongresa turismo kaj Ada ĉefredaktas "Heroldo de Esperanto".

Jose Luis Pérez Ovilo, el Murcio sendis fotokopion de sia letero publikigita en "La Opinion" (ĵurnalo el Murcio) rilate la uzon de Esperanto en la Olimpiaj Ludoj.

Mary Luz González feriis en Madrido sed ŝi denove vojaĝis al Ĝenovo, kie ŝi laboras kaj lernas italan lingvon. Emi Gonzalez ankaŭ studas eksterlandan lingvon, la francan; ŝi restos en Parizo tri monatojn.

Grava konkludo.- Tranokto en la Liceo: Oni ne uzu la Bibliotekon por tranokti. Principe, oni rajtas uzi la Liceon por tranokti nur, se oni venas por labori por Esperanto. Esceptokaze, la prezidanto aŭ, se li/ŝi malĉeestas, du estraranoj rajtas permesi tranoktadon ĝis maksimume 2 (du) noktoj en okazo de ekstrema, evidenta bezono, se alia solvo ne eblas.

VENONTAJ PROGRAMOJ VENONTAJ PROGRAMOJ

Ĉiujn lundojn okazos konversacia rondo en nia sidejo. Atocha 98-4º je la 19,00-a horo

12-an de decembro..... Miguel Fernandez prelegos pri "Miguel Hernándes: vivo kaj verkaro". 19,00-a horo

21-an de decembro..... MERKREDO. Konversacia rondo ĉe Ateneo.de Madrid strato Prado nº 21. 19,00a horo.

Para atender estas llamadas y para la venta de Lotería estaremos en el Liceo por las tardes de 7 a 9 la semana del 28 de noviembre al 3 de diciembre (el sábado por la mañana)

EKSKURSO AL JADRAQUE (Guadalajara). Por sexto año consecutivo participaremos en la "Fiesta de las migas". Aun no conocemos la fecha exacta pero será uno de los **primeros domingos de diciembre**. Si estas interesado en ir llama el lunes 28 al Liceo, 2-30-87-98. Iremos con coches por lo que es necesarios saber quien va para distribuirnos.

ZAMENHOFA FESTO Estamos pendientes de confirmación de un local para que actue la ORQUESTA Y CORO "Verda Stelo"", después habrá una cena en un lugar aún no determinado. Los interesados en asistir a ambos actos deberan de informarse del día (posiblemente 16 ó 17 de diciembre), hora (por la tarde) y lugar, llamando al Liceo los lunes. Para la cena es necesario hacer reserva: Precio aproximado 1.000 pts.

Mistera kurso de Esperanto.- La ĵurnalo "El Pais" anoncis kurson en Madrido (Plaza de España nº 1-4º.Marde je la 19-a horo).Ni ankoraŭ ne konas la organizanton ĉar, kiel kutime, esperantistoj preferas labori isolitaj.

# Los idiomas

Villa de Madrid 16-30/XI/1988

Evaristo Acevedo

SER demócrata tiene sus exigencias y una de ellas consiste en colocar la Constitución de 1978 en la mesilla de noche para repasarla antes de dormir. Perfecciónase así el ciudadano en la democracia y el organismo acaba por agradecerlo, pues concilia el sueño con más facilidad. Además, aprende que este país puede llamarse también "Estado de las autonomías", al constar de 17 comunidades autónomas, entre las cuales brilla por derecho propio la de Madrid.

Pero la Constitución, roscón de Reyes legislativo, posee también su sorpresa correspondiente: los idiomas. Leyendo el artículo 3, muy recomendable cuando se está algo desvelado, vemos que la lengua oficial del Estado español es el castellano y que las demás lenguas españolas son también oficiales en sus respectivas comunidades autónomas. Los indígenas de Cataluña, Vasconia y Galicia, por ejemplo, tienen derecho a que les enseñen en sus escuelas dos idiomas: el catalán y el castellano; el vasco y el castellano; el gallego y el castellano. A cargo de los presupuestos generales del Estado que todos pagamos con nuestros impuestos, naturalmente.

Y los madrileños, ¿qué? ¿Cuántos idiomas nos enseñan en la escuela a quienes hemos nacido en Madrid? Uno y vamos que ...emos: el castellano. Evidente injusticia que va contra el artículo 14 de la Constitución, según el cual "los españoles son iguales ante la ley, sin que pueda prevalecer discriminación alguna por razón de su nacimiento". ¿Es que los madrileños, por haber nacido en Madrid, no tenemos igual derecho que catalanes, vascos y gallegos a que nos enseñen gratis otro idioma, además del castellano?

El nombre de ese otro idioma nos lo da el callejero madrileño, ya que el 18 de diciembre de 1982 fue inaugurada en el distrito de Ciudad Lineal la calle Idioma Esperanto. Los del foro conmemorábamos así la obra y memoria del doctor Zamenhof, creador de esa lengua fraternal. Con ello, la Comunidad de Madrid daba un paso al frente en el reconocimiento de la valía de este hombre, nombrado "benefactor de la humanidad" en 1959, con motivo de su centenario, por la Unesco.

Además de la verbena, la "chupa", el pañuelo de crespón y el "agarrao", los madrileños tenemos que revitalizar el esperanto, creando "esperantokolas" donde se enseñe a niños, adolescentes y adultos este idioma auténticamente posmodernista, cuya gramática sólo tiene un artículo, ningún acento y 16 reglas fijas, las cuales no necesitan compresas. ¡Ya está bien de tener que perfeccionar el inglés a base de viajes a la Gran Bretaña, aguantando además que nunca nos devuelvan el peñón de Gibraltar!

Resulta paradójico que la Europa de los 12 luche por abolir las barreras aduaneras y a nadie se le ocurra acabar de una vez con unas barreras lingüísticas culpables de que Europa no consiga lograr la ansiada hermandad continental. Junto al Mercado Común Europeo, impulsemos los madrileños la lengua común europea: el esperanto. Con ello seremos los paladines de la confraternidad humana, convirtiéndonos en la comunidad autónoma más universal de España. No en balde Madrid ha sido nominada Capital Europea de la Cultura para 1992.



## IO PRI LA INTERNACIA AKADEMIO DE LA SCIENCOJ DE SAN MARINO (AIS)

Ĝi estas institucio fondita laŭ decido de la sanmarina registaro sed esence ne ŝtata sed internacia. AIS uzas por konferenprelegoj kvar oficialojn lingvojn sed la ĉefa laborlingvo laŭstatute estas Esperanto. Agade subtenas AIS: Itala E-o Federacio, Unuiĝo Franca por E-o, E-o Instituto de Japanio, E-o Societo Malta, E-E-o Asocio de Britujo, Itala E-o Instituto, ORE, ISAE, IAdEM, TAKIS kaj UEA. Kiam apogos HEF? (Pensu pri la scienciaj horoj: eble ili povas esti ankaŭ aŭspiciitaj de AIS)

La principo de AIS estas: scienco senna cieco kaj la celo: iom post iom redukti la lingvo diskriminacion en la internacia scienca kunlaborado.

## KIOM DA ESPERANTISTOJ PAROLAS BONE ESPERANTON?

Laŭ Zlatko Tišjar el Jugoslavio (EPĈ nº 5 1988) nur 10.000 personoj en la mondo bonege konas la internacian lingvon. Feliĉe por interkompreniĝi oni ne bezonas bonege paroli!!!

SI DESEAS JUGAR A LA LOTERIA, Nº 09357, ENVIA POR CARTA UN CHEQUE A NOMBRE DE LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO (antes del 1 de diciembre). TE ENVIAREMOS A VUELTA DE CORREO LAS PAPELETAS. (Pedido mínimo 500 pesetas)

# nia voĉo

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98. MADRID - 28012

